**NIA VOĈO**

Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-EXT. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas Manolo Parra
manolo.parra@yahoo.es

**NOVEMBRO 2010**

MEL RICEVIS SUBVENCION

Ĵus la Liceo ricevis el la madrida urbodomo 767,50 eŭrojn. Temas pri subvencio por aĉeto de portebla komputilo kaj projekciilo. La afero postulis de nia prezidanto Juan del Castillo plenigi multajn formularojn kaj multfoje viziti diversajn instancojn. La aĉetotaj aparatoj utilos por publikaj prezentoj, klubaj prelegoj, kongresoj, ktp.
La sekretario, Manolo Parra

CURSO PRESENCIAL

Plu daŭras la baza E-kurso en la ejo de HEF. La kurso okazas ĉiusabate inter la 11.00 kaj la 13.00, instruas Pedro Hernández.

VIZITIS MADRIDON …

Petra Szmideliusz kaj amiko, kiujn oni renkontis dimanĉe 7ª en urbocentra kafejo.

VIZITOS MADRIDON …

Jean-Pierre Lambert kaj amikino de la 3ª ĝis la 6ª de decembro. Same, preskaŭ certe ni kunvenos kun ili iam dum la semajnfino.

HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO – 2011 – EL ESCORIAL

Laŭ interkonsento dum la kunsido pri la HK, mi ĵus babilis kun Katalin Kovacs pri organizado de la oficialaj ekzamenoj laŭ la eŭropa referenckadro (B1, B2 kaj C1) dum la hispana kongreso. La ideo plaĉis, sed ni devos plu interŝanĝi informon pri la kondiĉoj, pagoj, ktp. Tamen, provizore ni povas jam proponi por "kolekti" homojn, kiuj ŝatus fari tiun ekzamenon.
Do, karaj, mi instigas vin ekzameniĝi (se mi ne eraras, ĝis nun estas nur tre malmultaj homoj en Hispanio kiuj havas diplomon, tri aŭ kvar - interalie mi), kaj instigi aliajn homojn, gelernantojn de viaj kursoj, ktp.
Pedro H.

ESPERANTA LOTERIO

La E-Grupo de Bilbao lanĉis loteri-kvitancojn, tute en Esperanto.
Ĉiu kvitanco kostas 3,00 eŭrojn, el kiuj oni ludas 2,50 eŭrojn (0,50 restas kiel mondonaco por la E-Grupo).
Se vi deziras aĉeti ilin, necesas unue enkontigi la monon en nia konto de BBK, numero 2095-0141-41-2218001550, je la nomo de "Grupo Esperantista de Bilbao".
Post ricevo de la mono, ni sendos al vi, per ret-poŝto, atestilon de

la aĉeto, kun la numeroj de la kvitancoj aĉetitaj.

Jesús Miguel García Iturrioz,
Sekretario de la E-Grupo de Bilbao

TRA LA MONDO

La paĝo de Sahara Esperanto-Ligo, en kunlaboro kun Andaluzia E-Unuiĝo, donas informojn pri la teruraj okazintaĵoj vivitaj nuntempe en Ajuno kaj en aliaj urboj. La informoj aktualiĝas de tempo al tempo. Ni invitas al Vi viziti la paĝon.
www.sahara-esperanto.ueuo.com

Reklamagentejo produktis televidan reklamon, kie la aktoroj parolas en Esperanto (kvankam ne 100% korekte). La konversacion oni subtekstigis, sed la subteksto intence diras tute alion ol kion diras la aktoroj... Ekzistas pluraj variantoj de la subteksto (12), ĉiam la sama konversacio, sed diversaj imagitaj tradukoj.
Fine la informo: unu vino, mil babiloj! - La reklamo aludas pri sento de kuneco, familia kunvivado, amikeco.
Ĉe la tradukado al Esperanto helpis Silvia Rottenberg, prezidantino de Argentina Esperanto-Ligo.
La filmoj troviĝas ĉe: http://www.youtube.com/user/UnVinoMilCharlas
Martin Schäffer, pere de Miguel G. Adúriz

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Prelego kun fotoj pri Uzbekio, lunde 15ª de novembro je la 18:30 h en la HEF-ejo. Carmen kaj Lupe rakontos pri sia freŝa vojaĝo.

Niaj konversaciaj rondoj okazas ĉiulunde ekde la 18:30 h en la HEF-ejo, strato Rodríguez San Pedro 13-3º-7, tel. 914 468 079.
Por sporadaj renkontiĝoj oni alvokos per la retlisto “esperanto-madride”.

******************************************************************************

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6-4ºB-EXT
28005 MADRID